



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Vizitu la
Germanan Esperanto-

Ekspozicio 1976

en Augsburg

=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 15/1976 - 8 aprilo 1976

Aperas ĉiusemajne

Ĉiujn labortagojn Esperanto per la svisaj antenoj

Berno (pp) - La Svisa Kurtonda Radio plioftigis siajn kronikojn en Esperanto ripetante ilin ekde la 5-a de majo dufoje. Ili do estas nun aŭdeblaj sesfoje en la semajno. La elsendoj okazas laŭ jena skemo:

D-ro Arthur Baur lunde je la 13,20 horo kun ripetoj marde kaj ĵaŭde je 23,35 horo.

Claude Gacond prelegas merkrede je la 13,20 horo kun ripetoj vendrede je la 13,20 horo kaj sabate je 23,35 horo.

La tempindikoj estas la mezeŭropa tempo.

La ondolongoj estas por ĉiuj elsendoj 75, 49 kaj 31 metroj, krome la tagmezaj elsendoj estas ankaŭ aŭdeblaj sur la ondoj 19, 16 kaj 13 metroj kaj la vesperaj sur 25 kaj 19 metroj.

La radiostacio estas dankema por korespondajoj; ĉiu kiu skribas riecevas detalan programinformon. La adreso estas: Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15.

Bonvolmesaĝo 1976

Jam de jaroj la Junularo de Kimrujo aŭdigas sian Bonvolmesaĝon okaze de la Bonvoltago. La ĉijara Bonvolmesaĝo por la Bonvoltago je la 18-a de majo tekstas jene:

La Junularo de Kimrujo salutas la Junularon de la Mondo je Bonvoltago! Pere de ĉi tiu mesaĝo ni oferas al vi ĉiuj, amikan manpremon.

Ni ege bedaŭras la nejustecon kiu ekzistas tra la mondo. Dum iuj homoj ĝuas abundon, milionoj mortas pro malsato. Bedaŭrinde, oni tro malmulte ekspluatatas, je loka nivelo, provizojn de krutaj materialoj; kaj riĉeco estas tro malegale ĝuata de la homoj. Pro tio, ~~la~~ duono de la homaro mankas manĝaĵo, taŭgaj loĝejoj, kaj medicinaj zorgoj.

Ni strebu al pli bona kompreno de la homaro - kaj tion ni atingos pere de edukado. Sed ni ne uzu edukadon nur por nia propra profito. Internacia eduka sistemo devas atenti pri la kulturo kaj tradicioj de malgrandaj nacioj. Celante modernan edukan sistemon, kaj uzante ĝin por la bono de la societo, ni povas certigi justajn vivkondiĉojn kaj plenan vivon por la morgaŭa junularo.

Dua Oficiala Bulteno de la UK 1976

Rotterdam (pp) - Aperis nun la Dua Oficiala Bulteno de la Universala Kongreso de Esperanto 1976 en Ateno kun ĉiuj gravaj informoj pri la provizora kongresa programo, pri loĝigo, Belartaj Konkursoj, ekskursoj, la junulara kongreso en Tesaloniki, la infana kongreseto, seminario pri la Ĉe-metodo kaj la oficiala postkongreso. Krome la bulteno enhavas "utilajn informojn" por la kongresano rilate al la vojaĝo kaj restado en Greklando.

La konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo

Rotterdam (pp) - Sub la supra titolo Universala Esperanto-Asocio eldonis plian numeron en la serio "Konsilaroj pri Esperanto-Agado". La subtitolo "Malgranda gvidilo al la aplikiĝo de la Fina Akto de la Konferenco en la laboro de la Esperanto-Movado" samtempe klarigas la celon de la konsilaro. El la enkonduko, kiun verkis Humphrey Tonkin, la prezidanto de UEA, ni citas:

"Por la Esperanto-movado la signifo de la Fina Akto havas tri diversajn aspektojn. Unue, ĝia forta emfazo je la kreo de kondiĉoj de monda paco kaj interkompreniĝo, kaj ĝia emfazo je apliko de la homaj rajtoj, kongruas kun la ĝeneralaj idealoj de nia Movado. Konkrete, ĝia esprimo de la deziro krei pli ampleksajn senperajn kontaktojn inter la civitanoj de la diversaj ŝtatoj alproksimigas ĝin al la celoj de UEA, kies statuto emfazas (para. 3) la plifaciligon de "ĉiuspecaj spiritaĵoj kaj materiaĵoj rilatoj inter la homoj."

Due, la Akto plurfoje aludas al lingvaj demandoj kaj al la lingva problemo. Oni eĉ povus aserti, ke ĝi tion faras ĝis nivelo nekutima en tiaj internaciaj deklaraĵoj. La lingva demando leviĝas kunlige kun la sekcioj de la Akto en kiuj estas pritraktataj minoritatoj, gastlaboristoj, kaj la eduka interŝanĝo. Ĝi estas subkomprenata ankaŭ en pluraj aliaj partoj de la Akto. Tiu emfazo je lingva diverseco estas afero nepre atentinda de la diversaj Esperanto-asocioj, kiuj siavice povas ĝin emfazi en siaj kontaktoj kun ŝtataj instancoj, parlamentanoj kaj la publiko ĝenerale. Kompreneble estas ankaŭ multaj lokoj en la teksto kie aperas optimistaj esprimoj pri la neceso de pli intima kunlaboro, kvazaŭ ĉiuj nacioj jam parolus saman lingvon kaj ne ekzistus lingvaj problemoj. Ankaŭ oni atentigu ŝtatajn instancojn pri tiuj mankoj, kaj pri la malforta lingva bazo de tiu optimismo.

Trie, la Akto aludas rekte aŭ nerekte al la cirkonstancoj de movadoj kiel la nia - neregistara laŭ karaktero, kaj konsistanta ĉefe el unuopaj privatuloj en la diversaj landoj. La plifaciligado de homaj kontaktoj, de vojaĝado, de turismo, de partopreno en kongresoj kaj konferencoj; la plivastigo de importado de libroj, de abonado al eksterlandaj gazetoj, ktp. - ĉio ĉi povus havi pozitivan efikon je nia laboro se la diversaj tiaj proponoj vere efektiviĝus."

La Konsilaro en amplekso de 8 paĝoj DIN A 5 resumas kaj citas tiujn partojn de la Fina Akto, kiuj plej rekte povus rilati al la agado de la Esperanto-movado kaj faras konklude sugestojn pri agado de Esperanto-parolantoj surbaze de la Fina Akto.

Interkonsento pri kunlaboro

Mannheim/Saarbrücken (pp) - La Esperanto-Amikoj Mannheim-Ludwigs-hafen (EAML) kaj Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL), sekvante la Konkludojn de la Pedagogia Seminario en Neustadt/Weinstr. (27.12.75 - 3.1.76) interkonsentis pri jenaj formoj de kunlaboro la 31-an de marto 1976:

- 1) Reciproka interŝanĝo de informoj;
- 2) Partopreno en aranĝoj de ambaŭ organizaĵoj
- 3) Kunlaboro en aranĝoj de ambaŭ organizaĵoj per
 - a) interŝanĝo de prelegantoj,
 - b) starigo de la libroservo de SEL,
 - c) aliaj servoj.

La interkonsenton subskribis por EAML Richard Reuchlin kaj por SEL Karl Burger.

Nova germanlingva broŝuro

Sub la titolo "Sprachwissenschaftliche Überlegungen zur Frage der leichten Erlernbarkeit des Esperanto" aperis nova germanlingva broŝuro en formato DIN A 5 en amplekso de 12 paĝoj. Aŭtoro estas prof. d-ro Max Mangold de la universitato de la Sarlando. Eldonis ĝin kiel represo el la revuo de la Sarlanda Asocio de filologoj "Gymnasium Saar", n-ro 1/1976, Sarlanda Esperanto-Ligo.

La broŝuro speciale taĝas por informado al lingvo-instruistoj kaj aliaj edukitaj personoj. La prezo estas 1,-- GM + afranko. La broŝuro estas havebla ankaŭ ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Jerzy Kowalski mortis.

Krakovo (pp) - Laŭ informo de Pola Radio mortis la 6-an de aprilo en la aĝo de nur 44 jaroj la pola esperantisto Jerzy Kowalski, Krakovo. Kvankam li estis de jaroj grave malsana, li tamen estis aktiva por Esperanto. Li konatiĝis speciale pro sia diligenta kolektado de eldiroj pri Esperanto fare de eminentaj polaj personuloj. Multaj el tiuj eldiroj estis disaŭdigitaj en la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio.

Etnismo

Antaŭnelonge aperis la 12-a numero de la Informilo pri etnaj problemoj sub la titolo "Etnismo". La dekdu-paĝa informilo en formato DIN A 4 enhavas diversajn artikolojn pri etnaj problemoj kaj ankaŭ artikolon pri la temo "Ĉu F.R.G. aĉetos 125 000 germanojn en Pollando?"

La informilo aperas 3 fojojn jare kaj kostas 8 GM por la jaro. Abonpagojn oni sendu al Uwe Joachim Moritz, Feldstr. 38, D-5190 Stolberg 8, poŝtĝirkonto Hannover 232612-306

Horizonto

Aperis la unua numero de "Horizonto", kultura kaj informa revuo de la "Neŭtrala Esperanto Movado" sub la redaktoreco de Inés Gastón, Hispanio. Formato 17,3 x 25 cm, 24 p. kun kovrilo. La revuo aperas dumonate, en eldonkvanto de 1000 ekzempleroj. Jara abonprezo 24,- GM, abonebla ĉe Irmtraud Hauptenthal, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler, p.k. Saarbrücken 15293-667.

Esperanto - ĉu revo aŭ realeco?

Augsburg (pp) - Okaze de la inaŭguro de la Germana Esperanto-Ekspozicio en la urbodomo de Augsburg, la 24-an de aprilo 1976, je la 11-a horo, parolos dipl.-ped. Rudolf Brand, Bamberg pri la temo "Esperanto - ĉu revo aŭ realeco?" Por la eksterlandaj legantoj de Pilo-Press estas aldonita al ĉi tiu numero la informo pri la programo okaze de la ekspozicio en Esperanto. La ekspozicia komitato ĝojus, se ankaŭ eksterlandaj gastoj ĉeestus la inaŭguran ceremonion.

Krome okazos kunveno de bavaraj esperantistoj, sabate je la 14-a horo en la Sindikata Domo (Gewerkschaftshaus), Schätzlerstr. 13. Speciale ni atentigas pri kunsido de kursgvidantoj, kiun organizas la GEI-fakestro pri ekzamenoj Gerald Tucker, dimanche, la 25-an de aprilo, en Hotel Post, Fuggerstr. 7, je la 10-a horo.

Informojn donas: Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f, 8901 Steppach, Tel. (0821) 48 81 49 (private) aŭ 23 5 21 (deĵore).

Esperanto en la Radio

Vieno. Dek minutojn daŭras la Esperanto-elsendoj el Vieno, sed la redakcio vere scias fari el tiu mallonga tempo varian kaj interesan programon. Tion denove pruvis la pasinta elsendo kun la semajna komentario de d-ro Alfred Macher, prezentita de Ingrid Plazotta kaj d-ro Karl Beckmann, kun la unua artikolo el la serio dediĉita al la aŭstra urbo Wels kaj verkita de d-ro Karl Beckmann, la leterkesto, el kiu ni eksciis ke pasintsemajne venis alskriboj de 10 aŭskultantoj el 4 landoj, nome Aŭstrio, FR Germanio, Pollando kaj Sovetunio. El FRG venis 5 alskriboj. Plue ni eksciis, ke la Esperanto-Redakcio de Pola Radio proponis al la Esperanto-Redakcio de Radio Vieno pli intensan kunlaboraĉon. "Ni akceptas, kompreneble, kun ĝojo", estas la Viena komento. Eĉ eksterlanda gasto parolis en la Esperanto-mikrofonon de Vieno, nome Stefan MacGill el Novzelando, kiu estis survoje al Oslo, Norvegio.

Stefan MacGill diris: "Bedaŭrinde nur unu tagon mi povas resti en Vieno, sed ĵus mi promenis en bela Schönbrunn. Mi tuj ekiros kaj post rapida prelegvojaĝo en Skandinavio eklaboros unu jaron en la Centra Oficejo de la Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam. Tie oni ekspedas librojn, informojn, gazetojn al esperantistoj tra la tuta mondo, kaj ankaŭ organizas internaciajn kongresojn. Tiu oficejo antaŭnelonge anoncis Volontulan Servon per kiu ili petas laborantojn. Por gajni internacian sperton en Esperanto-medio, mi venis el Nov-Zelando kie mi estis instruisto.

Momente en Nov-Zelando okazas oficialaj klasoj en Esperanto por pruvi ĝian utilecon. En 1975, 280 geknaboj, 11 - 13 jaraĝaj, lernis la lingvon en tiuj klasoj. La Eduka Fako presis materialojn kiujn mi preparis por ili ankaŭ okazigis por ni oficialan dumservan kurson por la instruistoj kiuj gvidis la klasojn. Do, okazas progreso eĉ en mia plejfora lando."

Svisa Kurtonda Radio. Esperanto-Balono super Zürich

Estas preskaŭ certe, ke baldaŭ ŝvebos Esperanto-balono en la svisa aero, kiu propagandos Esperanton. D-ro A. Baur anoncis en sia pasinta elsendo, ke la Esperanto-Societo Zürich interkonsentis pri tio kun la posedanto de la balono. La ĉi-foja prelego de d-ro A. Baur pri referendumo en Svislando temis. Estis bone, ke li interrompis sian serion pri la reto-romanĉa lingvo. Tamen li daŭrigos la serion post kelkaj semajnoj. - Ges-roj G₂cond tamen daŭrigis sian serion pri la per-Esperanta instruado de nacia lingvo.

Varsovio. La Esperanto-Ekspreso disaŭdigis du intervjuojn kaj la kurtimajn erojn. Oni vere devas sin demandi kial la oficiala Esperantomovado, UEA, la landaj asocioj ktp. ne pli efike utiligas tiun specife Esperantan - programon por anonci siajn arangojn, planojn kaj informojn. La Esperanto-Ekspreso vere povus esti aktuala ĉiu-semajna informilo por la movado, se daŭre alfluis freŝaj kaj aktualaj informoj. La Koncerto kun bondeziroj ĉiam estas abunde provizita per gratulaj mesaĝoj ktp. Sed observanto povas konstati, ke la salutoj ĉefe limiĝas al la "socialisma bloko" kaj al la virina parto de la aŭskultantaro. Estus bone se ankaŭ salutoj el kaj al la okcidentaj landoj pli ofte estus en-eterigitaj. Sed tio dependas de la aŭskultantoj. El la ĉi-semajna rubriko "Ella vivo de PEA", verkita de Jan Klimek, ni eksciis, ke dum la unua semajnfino de aprilo kunvenis en Krakovo la gvidantoj de la landaj asocioj el la socialismaj landoj por konsulta renkontiĝo. Estis reprezentitaj la Esperantomovadoj el Hungario, Ĉeĥoslovakio (ĉeĥa kaj slovaka asocioj), Sovetunio, GDR kaj Pollando. En la semajno de la 1-a ĝis 7-a de aprilo la Varsovia E-Redakcio ricevis 70 korespondaĵojn, inter ili 39 de la plej skribemaj 10 aŭskultantoj. Je la pinto ĉi-foje staras Tom Mattison el Britio kun 12 alskriboj!